sub la suda kruco ★

ESPERANTO



Jubilea kongreso!

Kial mi studas Esperanton?

Dume, alloke

An unforgetable Esperanto School

Free Software

Ni komencu urso-kurson!

oficiala organo de la aŭstralia kaj nov-zelanda esperanto-asocioj
volumo 19 [3] • numero 107 • septembro 2011

ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

Redaktoro | Ŝandor Monostori
Kontaktadreso | esk2@esperanto.org.au
P.O.Box 1097
Bendigo Central Vic 3552
Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto Sub La Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA).
Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:
AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEA | www.esperanto.org.nz – nzea@esperanto.org.nz

Kontribuu al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunktoj, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia oficiala kontaktadreso, "esk@esperanto.org.au".
Limdato por kontribuoj por la sekva numero:
15 de novembro 2011
La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA, aŭ de NZEA.

Copyright @ 2008, AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj.



Sur la kovrilo: Nova hotelo kaj kongresejo Bella Sky en Kopenhago. La 96a UK okazis ĉi tie.



Ni havis festan kongreson



Invito al la Aŭstralia Somerkursaro



Kial mi studas Esperanton?



..tamen indis fari ĝin



Dume, aliloke



Kongresu kun NZEA en Rotorua



An unforgetable Esperanto School



Free Software



Ni komencu urso-kurson!

Antaŭparolo

de Ŝandor Monostori



Dana kaj Esperanto flagoj antaŭ la kongresejo en Kopenhago

En julio en Adelajdo okazis nia longe atendita jubilea centjariĝa kongreso. La LKK multege laboris kaj agadis dum la tuta jaro por certigi, ke la kongreso estu granda sukceso. En ĉi tiu ESK la plimulto de la kontribuaĵoj temas pri la jubilea kongreso. Inter aliaj ni trovos interesan prelegon, kiu okazis dum la adelajda kongreso pri la historio de Kanbero. La artikoloj montras, ke la partoprenintoj estas tre kontentaj pri la renkontiĝo.

Krom la temo de la jubilea kongreso troviĝas artikoloj pri komputilaj programoj senpage akireblaj per la interreto kaj instruado de Esperanto en lernejoj.

Ĉi tiu ESK ankaŭ havas gravajn informojn pri baldaŭaj renkntiĝoj en Aŭstralio kaj Nov-Zelando, pri la Aŭstralia Somerkursaro okazonta en Sidnejo kaj la Nov-Zelanda Esperanto kongreso okazonta en vulkaneca Rotorua.

La Universala Kongreso finiĝis nur antaŭ kelkaj semajnoj en Kopenhago, ĉefurbo de Danio, kaj laŭ la Kongresa Libro aliĝis 13 esperantistoj el Aŭstralio. Kelkaj aŭstraliaj partoprenintoj ankoraŭ vojaĝadas en Eŭropo aŭ realkutimiĝadas al la aŭstralia tempo-zono. Espereble la decembra ESK havos multajn raportojn pri la Universala Kongreso.

Dum la jubilea kongreso kelkaj legantoj de ESK proponis ke estu pli granda la kontrasto inter la teksto kaj la koloro de la paĝo. Mi esperas, ke la legantoj trovos ĉi tiun numeron pli facile legebla ol la antaŭajn.★

You are cordially invited to attend the inauguration of the exhibition:

La eksposicio finiĝos la 24-an de novembro 2011. Sufiĉe da tempo viziti kaj esplori ĝin.

★

ESPERANTO: PROMOTING EVERYONE'S LANGUAGE

South Australian Migration Museum
82 Kintore Avenue, Adelaide SA
Sunday 11th September at 3 p.m.
To be opened by Professor Ghilad Zuckermann, University of Adelaide

Arranged and curated by Esperanto in South Australia

Supported by:

PARALLAX

Raporto pri Adelajdo

Ni havis festan kongreson

de Katja Steele

La aŭstralia esperantistaro celebris – almenaŭ tiuj, kiuj partoprenis la jubilean kongreson en Adelajdo. Ĝi okazis inter la 9-a kaj la 17-a de julio en la sama urbo kie okazis antaŭ 100 jaroj la unua kongreso kaj eĉ en la sama universitato: Universitato de Adelajdo. Ĉi-kongreso estis laŭvice la 39-a kaj partoprenis ĝin 64 esperantistoj, el kiuj unu venis el Usono, unu el Francio, unu el Novkaledonio, tri el Nov-Zelando kaj unu el Libio.

Se oni kalkulas la antaŭkongresan vesperon, kiam pluraj lokuloj ĉeestis la publikan koncerton de nia gast-kantisto JoMo, entute ni kunestis 8 tagojn. La sekvan tagon alvenis la unuaj gastoj, dudeko el ili per trajno. Pluraj el tiu grupo vojaĝis vestitaj en malnovstilaj vestoj, rememore al la E-pioniroj, kiuj faris la saman trajnvojaĝon el Melburno al Adelajdo. Ili elvokis intereson de la pasaĝeroj jam entrajne kaj ankaŭ en la adelajda stacidomo, kie atendis ilin la anoj de LKK kaj JoMo kun gitaro kaj gajaj kantoj. Sekvis enloĝiĝo – parte en la kolegio de sankta Anna, parte private en aliaj lokoj. La kongresanoj ricevis tekon kun kongresa libro, kantaro, du specialaj kongresaj poŝtmarkoj, nomŝildo, mapo kaj skribilo. La interkona vespero okazis en restoracio Vagabondo, kie atendis la alvenantojn la lokaj esperantistoj.

Partoprenantoj de la unua Esperanta Kongreso en Adelajdo 191



FIRST AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS.

Ni jarkunvenis komence de la semajno kaj fine de la semajno ni diskutis kun Sandor Horvath pri kiel pluen en la venontajn 100 jarojn.

La ĉefprelegantо de la kongreso estis la elstara esperantisto kaj movadano Profesoro Humphrey Tonkin. Li prelegis al esperantistoj kvar foje pri temoj: Historio de Esperanto; Kiu estu la internacia lingvo, la angla aŭ Esperanto?; Estontaj perspektivoj de Esperanto; ankaŭ por ĝenerala publiko pri Linguistic Justice and Linguistic Understanding kaj unu fojon al grupo de studentoj de Prof. Ghil'ad Zuckermann en Universitato de Adelajdo mem.

Dum la semajno prelegis ankaŭ: Terry Manley (George Collingridge), Trevor Steele (Aŭstralia E-literaturo), Margaret Furness (Rememoroj pri la UK en Adelajdo), Charles Stevenson (Komenco de Esperanto en Sud-Aŭstralio), Huigh Malcolm (Dizajnkonkurso pri Kanbero), Helen Palmer (Unu tago en la vivo de mediogardisto), Max Wearing (Dekdu sezonoj en Esperantujo), JoMo (La okcitana), Alan Bishop (Matematiko), David Ryan (Nov-Zelando).

Ni kantis aŭ muzikis jam la antaŭkongresan tagon en la adelajda Folk Center (koncerto de JoMo), por la esperantistoj JoMo kantis dimanĉe kaj rakontis pri sia kariero kaj kantis merkrede, Alan Bishop gvidis la interesiĝantojn pri korusa kantado tra la tuta semajno, Roger Springer akompanis nian festan procesion kaj la bankedan ceremonion per sak-ŝalm-ludado kaj neesperantista balalajko-duopo koncertis por ni.

Rilate la lernejajn aferojn ni havis kunsidon de ILEI, kvar E-lecionon por komencantoj (gvidis Trevor Steele kaj la infanojn instruis Cathy Taggart), prelegon de Gordon Coleman pri lia E-instruado en adelajda baz-lernejo kaj prezentadon de skeĉo de la lernantoj de Gordon; Penny Vos prezentis la projekton Mondeto. Ŝi ankaŭ instruis familion de hejm-lernantoj (homeschoolers) dum la tuta semajno.

Partoprenantoj de la Jubilea Kongreso en Adelajdo 2011



Esperantistoj estas ofte ankaŭ naturamantoj, ni do ekskursis en la adelajdan botanikan ĝardenon kun Pat Palmer, krad-rostis en la nacia parko Belaire kun Helen Palmer kaj deko da interesiĝantoj havis apartan bus-ekskurson al la adelajadaj montetoj kun Nancy Roy.

Rilate la religiajn aferojn ni havis ekumenan renkontiĝon kaj Paul Desailly gvidis kunvenon pri bahaismo.

Por senstreĉiĝi ni floraranĝis (kun Katja Steele), kvizumis (kun Trevor Steele) kaj lernis pri E-filmoj kaj pri Esperanto en filmoj de Sandor Horvath kaj Humphrey Tonkin. Por pli bone konatiĝi ni havis krom la interkona vespero kunvenon, kie kelkaj el la kongresanoj aparte prezentis sin al la ĉeestantoj. La kongreso finiĝis per bankedo kun festa torto kaj el Germanio menditaj Zamenhof-kuketoj.

Dum la kongreso funkciis libroservo gvidata de Katja Steele.

La fotado dum ĉi tiu kongreso havis siajn specialaĵojn: ne nur ke ni aparte fotiĝis en la lokoj de historiaj fotoj (ĉe universitata konstruaĵo Mitcham kaj en Belaire), sed pluraj el la ĉeestantoj ankaŭ vestis sin en la stilo de la komencaj 1900aj jaroj. Ĉe la Mitcham-konstruaĵo bonvenigis nin kaj fotiĝis kun ni la vickanceliero de la universitato prof. Nick Harvey.

La plimulto de la partoprenantoj taksis la programon pozitive (vidu la induviduajn komentojn). Evidentiĝis, ke la kvereloj de la lastaj jaroj ne ludas grandan rolon kaj ni esperas ke tiu-ĉi kongreso helpos nin regajni la ĝojon kaj entuziasmon de esperantisteco. ★

Alan, Miranda, Paŝa, Jenny kaj Carol alvenas per trajno en jubilea stilo



Invito al Somerkursaro

Internacia Domo - Universitato de Sidnejo
8a ĝis la 21a de januaro, 2012.
La Internacia Domo bonvenigos nin per senpaga rostfesto la 8an.
Bone konataj Instruistoj de Esperanto instruos:
D-ro José Antonio Vergara el Ĉilio venos per helpo de NZEA kaj AEA.
Trevor Steele, Esperanta kaj anglalingva verkisto, kaj Komisianto de Ekzamenoj.
Hazel Green, instruos kantojn kaj drametojn; Komisianto - Korespondaj Kursoj.
Rainer Kurz, Esperanta instruisto el Germanio, kiu sekvas la sunon al Aŭstralio.
Diano Lukes instruos infanojn "Talking to the Whole Wide World" de Penny Vos.
Ĉi-foje, okazos iomete pli intensiva kurso, por 4 niveloj kaj infanoj.
Ĉar la instruado de komencantoj estas la plej grava kaj la 4a nivelo povos lukti kun la plej alta, do ni dividas iliajn matenajn instruadojn inter José kaj Trevor.
La komencantaj kursoj - nomota - Into a new world - En Novan Mondon,
La 4a nivelo - nomota - La Netaksebla Valoro (aŭ Valuto?) de Esperanto.
Rainer instruos la 3an nivelon - Kiel ni uzis/as/os Esperanton en niaj vivoj.
Hazel instruos la 2an nivelon - Nun ni Parolas Esperanton Flue kaj Kune.
Semajnfinaj kaj noktaj agadoj:
Ni faros ekskurson dum la meza semajnfino al marbordo kaj je la fina semajnfino al la Bluaj Montoj aŭ vi povus resti en Internacia Domo kaj prizorgi por vi mem sole aŭ grupe kaj ĝui la viglan vivon en Sidnejo laŭ via plaĉo.
Alan Bishop aranĝos vesperan agadon. Bonvolu diri al li tion, kion vi volas fari.

Ni saltadas al nia kumputilo, ke ni tuj aliĝu ĉe
www.aea.esperanto.org.au



Gajnu rabaton, se vi pagos $1,000 po persono por 14 noktoj aŭ $550 por 7 noktoj antaŭ la fino de Oktobro.

Baza kosto persone estas $100 por registriĝo kaj nur $35 nokte, kaj $35 por 3 manĝaĵoj tage, kiu estas malmulte kosta en Sidnejo.

Infanoj kun plenaĝuloj nur devos pagi por manĝaĵoj.

Dormĉambro tage kun 3 manĝaĵoj estas $80 kaj $10 registriĝo.

Tagstudantoj pagos $10 tage aŭ $100 por la tuta dusemajna kurso.



Kial mi studas Esperanton?

Unu el la programeroj de la jubilea kongreso estis prezentado de unuopuloj, kiuj rakontis pri sia motivo lerni Esperanton. Jen por vi tri el ili.

Ashley Campbell

En la lernejo mi havis malbonan tempon studante la anglan lingvon. Mi trovis la anglan literumadon tre malfacila. Ankaŭ la gramatiko estis tia. Mia elementa lernejo ne instruis alian fremdan lingvon.

Mi estis feliĉa, ke tridek jarojn poste mia frato Chris instruis Esperanton en sia elementa lernejo. Liaj studentoj estis bonŝancaj.

Mi konscias, ke multaj homoj en la mondo parolas du aŭ plurajn lingvojn. Mi kredas ke mi ne estas tro maljuna por lerni alian lingvon.

Ni havas maljunajn grekajn najbarojn, kiuj havas problemojn paroli la anglan. Iam mi pensis, ke la greka estus bona lingvo por komuniki kun ili facile.

Kial mi studas Esperanton anstataŭ la greka? Ĉar eble niaj grekaj najbaroj decidos baldaŭ vivi en alia domo.

Krom tio Esperanto estas facila lingvo. Mi ĝuas la logikajn regulojn, kiujn Zamenhof inventis.

En mia domo du homoj, Sandor kaj Helen, flue parolas Esperanton. Ili inspiris min en mia celo lerni la internacian lingvon.

Krom Esperanto mi havas multajn aliajn interesojn, inter ili pri jogo. Mi studas malrapide.

Mi bone memoras ke mi trovis jogon tre malfacila kiam mi komencis. Nun mi ĉiam ĝuas ĝin. Mi estas certa ke iam mi bone parolos Esperanton.

Ĝi helpas/os min ekzerci mian cerbon kaj ĝi povas eviti, ke mi havu demencon.

Bobaker Madi

Mi estas Bobaker. Mi venas el Libio. Mi studas ĉi tie. Mi estis en Aŭstralio dum unu jaro.

Mi komencis lerni Esperanton kiam mi studis la anglan en la Universitato de Adelajdo kun mia Sandor, kiu estis samtempe mia instruisto de la angla.

Mi lernis Esperanton dum pli ol ok monatoj, unu horon semajne. Komence mi trovis malfacile prononci Esperanton sed post ekzercoj ĝi estas pli facila.

Mi ŝatas Esperanton kaj decidis lerni ĝin pro kelkaj kialoj.

Unue, ĝi estas facile lernebla. Ekzemple, malsamas la viraj kaj inaj vortoj aldonante "in": patro, patrino.

Due, tio helpis min lerni vortojn de la angla. Ekzemple,"domestic" en la angla havas ligon kun "domo".

Trie, la lernado de Esperanto helpis/as/os min trovi amikojn en la tuta mondo. Mi serĉas en la reto kaj trovis jam multajn.

Plue, mi nun konas multajn homojn en Adelajdo kiuj parolas Esperanton.

Alia kialo por lerni Esperanton estis malfermi mian menson por lerni pli facile plurajn aliajn lingvojn, ekzemple la italan, la hispanan kaj la francan, ĉar Esperanto estas miksaĵo de vortoj el tiuj lingvoj.

Fine, lerni Esperanton estas amuze kaj ni bezonas amuzon kaj tiel mi povas ludi en Esperanto.

Mi rekomendas al ĉiuj lerni tiun lingvon pro tiuj kialoj.

Dankon al Sandor, mia instruisto kaj JoMo kiu helpis min prepari tiun-ĉi paroladon.

Paul Green

Por mi Esperanto signifas ne nur la lingvon sed ankaŭ la eblecon kontakti homojn alilande, eĉ se niaj patrinaj lingvoj estas malsamaj.

Esperanto estas la sola lingvo kiun mi parolas krom la angla.

Kial mi lernis/as la lingvon?

Dum kelkaj jaroj mia kara edzino Hazel lernas Esperanton, kaj ĉeestis multajn kunvenojn. Mi estis tute okupata en mia profesio kaj tiu lingvo ne interesis min. Tamen kiam Hazel anoncis ke ŝi volas ĉeesti la UK-on en Berlino en 1999, mi volis akompani ŝin. Ŝi forte proponis ke mi lernu la lingvon.

Do, dum kelkaj monatoj mi studis per interreta kurso kaj la helpo de Hazel kaj akiris kelkajn vortojn kaj frazojn de la lingvo.

Ni vojaĝis al Eŭropo kaj partoprenis antaŭkongresan eksurson kaj la UK-on. Estis miraklo ke mi, kiel tuta komencanto kapablis paroli kun pola viro kaj eĉ faris ŝercon kiun li komprenis kaj ridis kun mi.

Ekde tiu sperto mi daŭrigas la studon de Esperanto. Nun mi ĝuas renkonti esperantistojn kie ajn ni estas en la mondo.★



Bobaker, JoMo kaj Jamal

Jubilea kongreso

Kelkaj komentoj de la kongresanoj

Ekde la komenco, kiam ni kolektiĝis grupe en kostumoj en Melburno por vojaĝi al Adelajdo, ĝis la lastaj aferoj ekz. la balalajka-koncerto kaj la bankedo, ni ĉiuj lernis, babilis kaj multe pensis pri Esperanto. (S.Connors).

Mankis plena programo por junuloj. (A.Turvey)

If we had to organise another congress we would arrange accommodation in the same place as the talks and activities. (Lutz-oj).

La unuan tagon mi ne ŝatis tiom longe atendi ĉe la pordo de la kolegio. (L.M.Berthelin)

La prelegoj de Prof. H.Tonkin estis eĉ pli interesaj ol mi atendis kaj la muzikado de JoMo estis brila. La procesio post la sakŝalmo al nia oficiala fotado estis bona. (H.Green).

I felt privileged having been present at the great lectures by Humphrey Tonkin. (P.Green).

Mi aparte ĝuis la prelegojn de H.Tonkin. (P.Palmer)

H.Tonkin kaj JoMo estas elstaraj. Ili ambaŭ energiigis la kongreson. Se mi organizus venontan kongreson, mi farus la samon. (Ch.Stevenson)

JoMo ŝtelis niajn korojn. Tiom da interesaj prelegoj kaj distraĵoj okazis, ke mi devis fari notojn por la anoj de nia eta ligo en Perth. Mil dankojn! Estis neforgesebla evento. (Sh.Gradussov)

Estis bona miksaĵo de aktivecoj kaj la programo estis sufiĉe plena. (A.Bishop)

JoMo estis brila, ĉarma homo, kiu vigligis nin per bela muziko kaj brila parolado pri la okcitana lingvo, pri kiu mi sciis nenion. Nun mi scias, ke Tuluzo estas la plej bela urbo de la mondo kaj la okcitana estis/as la lingvo de la trobadoroj kaj la amo. (E.Mortimer)

As a beginning esperantist I was worried that I would find it difficult to speak and risk making mistakes, but I have found it a lot of fun. I went away wanting to learn a lot more Esperanto. (J.Calder)

The university was a good choice of location. (Lutz-oj)

Tre amika grupo kaj mi sentis min tre bonvena. (J.Birchal)

Post la bona etoso kaj la ŝanco aŭskulti kaj paroli Esperanton estas facile kredi, ke ĝi daŭros kaj progresos....Mi partoprenis refoje en aferoj, kiujn mi ne ofte faras ekster Esperantujo: kantado antaŭ aŭskultantaro, aktorado en teatraĵo kaj prelego antaŭ la grupo. Dankon pro la ŝanco, Esperanto-Aŭstralio. (T.Manley)★



..tamen indis fari ĝin

Intervjuo kun la LKK de la jubilea kongreso de AEA

La 16-an de julio, sabate, la jubilea kongreso finiĝis per bankedo. La sekvan tagon forvojaĝis el Adelajdo la lastaj gast-kongresanoj kaj la lokaj organizantoj de la aranĝo fin-fine povis malstreĉiĝi.

Kiam venis la decido organizi en Adelajdo jubilean kongreson?

Laŭ nia memoro en Adelajdo ni parolis pri la temo jam en 2008. Ni havis unu historian foton (la kongresanoj de 1911 en Belair), metis ĝin sur folion de papero kune kun kelkaj ideoj pri tio, kion ni celas, kaj "oficiale" donis ĝin al la estraro de AEA kaj ĉeestantaj esperantistoj dum la somerkursaro de 2009 en Sidnejo.

Ĉu vi ne timis pri fiasko? La krizo en la aŭstralia movado estis ja jam fakto.

Ni kredis, ke la plejmulto tamen volas pacon, volas plue renkontiĝadi. En Adelajdo ni havas negrandan, sed amikan grupon de esperantistoj kaj la somerkursaroj en nia urbo estis popularaj.

De kiam datiĝas la oficialaj preparoj?

La unuan LKK-kunvenon ni havis en majo 2010. Sandor Horvath, Trevor Steele, Indrani Behary-Lall kaj Katja Steele estis la anoj de la prepargrupo. Pri ĉiu kunveno ni faris protokolon, la plenumon de la taskoj ni daŭre kontrolis. La protokoloj estis sendataj al la estraranoj de AEA kaj kelkaj aliaj aktivuloj.

Kaj venis la unua krizo...

Jes. Ni preparis la bazan programon, faris la kalkulojn, starigis specialan kongresan retpaĝon, metis anoncojn en internacie legatajn E-ĵurnalojn – kaj la homoj ne aliĝis! La aliĝkotizo montriĝis tro alta. Kiel konvinki la homojn, ke inviti ekstraordinaran preleganton el Usono kaj bonegan kantiston el Francio kostas, sed ke indas pagi la prezon? Bone, ni malaltigu la aliĝkotizon, sed tio tre verŝajne rezultigos financan deficiton. **Ĉu AEA pretas akcepti la riskon? Ĉu ĝi kovros la eventualan minuson?** Ne estis simpla situacio, sed fine ni atingis, ke la estraro de AEA garantiis kovri la eventualan malgajnon kaj ni disanoncis la novan prezon: 100 dolaroj.

Ĉu estis ankaŭ iu dua krizo?

Ni esperis, ke en la preparojn de la festa kongreso engaĝiĝos la "tuta" Aŭstralio. Eraro. Ni eĉ faris liston de farendaĵoj por ke oni (la neadelajdaj helpemuloj) povu elekti kion fari (ekz. prepari anonc-standardojn oni same povus en Darwino kiel en Tasmanio...), ni telefonis, retis... Ni petis de la Universitato de Adelajdo 5 ejojn kaj ricevis de ĝi 6! Senpage! Tio ne estas bagatelo. Granda sukceso – sed se ni estos nur manpleno?

Ĉu simplis atingi la subtenon de la universitato?

Fakte sufiĉis la idealismo de Sandor kaj unu petletero. Kaj eble la fakto, ke ni kunvenos dum la feria tempo. Sandor estis la kuraĝulo kaj vi povas imagi la pezon sur lia koro, kiam la aferoj eklamis. Iuj eble dirus, ke ni elektis nekonvenan tempon por kongresi. Ideala tempo ne ekzistas, en la neferia periodo oni eble ne venus, ĉar la infanoj estas en lernejo...

Sed ĝuste la universitataj ejoj kaŭzis al vi neatenditan kapdoloron, ĉu?

"Dank'" al unu ne aparte lerta oficisto de la universitato du semajnojn antaŭ la kongreso la ejoj, kiuj estis donitaj al ni 8 monatojn antaŭe, subite estis bezonataj por aliaj celoj. Ni ricevis poste anstataŭajn salonojn, sed ili estis malpli konvenaj ol la originalaj kaj la disanoncitaj nomoj de la konstruaĵoj kaj de la ĉambroj ne plu validis.

Ĉu la invito de Humphrey Tonkin kaj JoMo montriĝis bona decido?

Certe neniu partoprenanto de la kongreso plendis pri ili, male, ni aŭdis amason da laŭdoj! Iam en 1910 oni havis vizite el Britio doktoron John Pollen. Lia entuziasmo, liaj prelegoj estis fortega puŝo por organizi la unuan kongreson. Mi ne legis pri iu posta simile grandinflua eksterlanda vizito al Aŭstralio, sed mi kredas, ke la nunaj prelegoj de Humphrey Tonkin certe restos longe memorataj. Retrospekte ni ĝojas, ke ni venigis lin, sed kredu min, tio kostis amason da zorgoj.

Vi pensas pri la financa flanko de la afero, ĉu ne?

Ne nur. Interalie, ĉar ni ne sukcesis aranĝi por li renkontiĝojn kun influhavaj homoj aŭ prelegojn al pli grandaj grupoj en aliaj urboj de Aŭstralio. Ni klopodis en Melburno kaj Sidnejo, sed malsukcesis. Imagu la streson, kiam Tonkin demandis nin, ĉu li entute venu?

Kiel vi sukcesis ĉi-rilate en Adelajdo?

Ne tre kontentige. Unu el liaj prelegoj ni aparte planis en la angla, por ke ĝi estu por la ĝenerala publiko. Ni pensis, ke estante en la universitata konstruaĵo

la studentoj de la universitato povus veni, diskuti... Ne tiel okazis. Atingo estis tamen, ke al la alvoko al profesoroj de la universitato reagis la gvidanto de la fako pri endanĝerigitaj lingvoj Ghil'ad Zuckerman kaj al grupo da liaj studentoj kaj kelkaj aliaj interesiĝantoj estis donita leciono de Esperanto (instruis Trevor) kaj poste prelego de H.Tonkin. Ĉiu flanko ege kontentis pri la afero.

H.Tonkin tamen vizitis Melburnon kaj Sidnejon kaj renkontis tie grupojn de esperantistoj. Sed JoMo restis la tutan tempon en Adelajdo, ĉu?

Jes, eĉ se la racio diras, ke se ni jam venigis lin al Aŭstralio, ni "uzu" lin. En Adelajdo ni sukcesis aranĝi unu koncerton por neesperantista publiko – en Folk Centre, la vesperon antaŭ la kongreso. Sed krom la lokaj esperantistoj kaj iliaj amikoj apenaŭ 2-3 aliaj venis. Nenies kulpo, simple oni ne venas al la koncerto de nekonata artisto disanoncita nur per simplaj afiŝoj (afiŝitaj en du universitatoj kaj kelkaj komunumejoj, bibliotekoj, same kiel tiuj pri la prelego de Tonkin). Necesus funkciigi grandan reklaman aparaton. Pozitiva ni konsideras la koncerton de JoMo en la elementa lernejo Sheidow Park, kie instruas Gordon Coleman. Lia tiea vizito estis perfekta reklamo por Esperanto kaj certe subteno al la klopodoj de Gordon.

Ĉu do la ekstera publiko ne sciis pri ni kaj nia kongreso?

Tion ni ne dirus, ĉar en Radio Adelaide ja dissendiĝis 4 intervjuoj (po unu kun Sandor, Trevor, Jomo, kaj Trevor kun Katja) kaj unu en la etna radiostacio EBI. Radio Renmark (la sola reaginto al nia "press-release" el proksimume 30 adresitoj) intervjuis H.Tonkin dum la kongresa ĵaŭdo, postkongrese estos elsenditaj du intervjuoj kun Tonkin kaj aparta kun Trevor en la juda elsendo de EBI. Ni petis ankaŭ la revuon The Adelaidian aperigi la historian foton antaŭ la universitata konstruaĵo kune kun la jubilea foto de kongresanoj. Interesa evoluo estis, ke la kongreso ricevis 94 salutmesaĝojn, la eksteraŭstralia esperantistaro do konsciis pri ni.

De kie tiu konekto al la juda komunumo?

En 2008 akceptis nian inviton al la Zamenhof-vespero Pam Mendels, la redaktorino de la juda programo (temas pri 30-minuta elsendo) de la menciita EBI. Kiam ni ĉi-jare atentigis ŝin pri nia nuna evento, ŝi volonte invitis nian ĉefpreleganton kaj Trevor, el kio estiĝis materialo por 3 elsendoj. Kiam ni demandis Tonkin pri lia opinio kiel atingi la ĵurnalistojn, lia respondo estis koni homojn, kiuj konas la necesajn homojn. Krome, ke ni kuniĝu kun aliaj malgrandaj NRO-j (neregistaraj organizoj). Tio certe funkciis en la kazo de la juda komunumo de Adelajdo, ja kiam ni proponis al la universitato inviti H. Tonkin al prelegoj, la sola reago venis de G.Zuckerman.

Ĉu vi invitis iun televidan stacion?

Ho jes! Monatojn anticipe ni sugestis havi diskutprogramon pri lingvoj kun H.Tonkin, T.Steele, eble alia gravulo de nia movado (ekz. Kep Enderby aŭ Ron Gates). Ni faris proponon ankaŭ al la Aŭstralia poŝto eldoni kongresan poŝtmarkon – rifuzite (ni tamen farigis kelkajn per "privata" mendo). Alia iniciato estis havi en Adelajdo Esperanto-straton; rifuzita. Ni havis kolektita decan amason da materialo pri la 100-jaroj de Esperanto en Sud-Aŭstralio kun intenco eldoni ĝin por la jubileo. Tio ne realiĝis pro manko de tempo kaj energio, same kiel la postspurado de posteuloj de niaj E-pioniroj...

Nur kvar homoj por tiom da taskoj vere ne sufiĉas, ĉu?

Jes, kaj du el ni dume havis siajn profesiajn postenojn dum Trevor kaj

Indrani suferis gravajn malsanojn. Sed pluraj el la lokaj esperantistoj tamen helpis, sen ili la kongreso vere ne realiĝus.

Ankoraŭ ne ripozu, por septembro vi preparas ekspozicion pri Esperanto en la Migrada Muzeo de Adelajdo. Kaj la nedefinitivan version de la montrotaj afiŝoj vi jam prezentis al la esperantistoj dum la kongreso.

Jes, ni sukcesis farigi tiujn afiŝojn ĝustatempe kaj nun laŭ la kolektitaj komentoj de esperantistoj ni plibonigos ilin. Havi tiun ekspozicion ni konsideras grava atingo kaj estas ĝojige, ke la plurmildolaran laboron de la dizajnisto ni ricevas senpage.

La lasta, la 31-a protokolo pri viaj LKK-kunsidoj, estas jam posteventa.

Jes, ni "kunsidis" ankoraŭ unufoje semajnon post la kongreso. Kia malpeziĝo ne havi limdatojn, nek zorgojn! Ni kalkulis, pesis, raportis. Kaj celebris. Kune kun ĉiuj mankoj tamen indis fari la kongreson – tio estis nia konkludo. Sed la vera juĝo estas tiu de la partoprenintoj. Kaj ni ja demandis ilin pri ĝi.

Ĉu do la kongreso estis gajno aŭ malgajno?

Finance, laŭ niaj nedefinitivaj kalkuloj, ni havas proksimume negrandan gajnon. Konsiderante la negrandan fonton de enspezoj (t.e. malmultajn aliĝintojn) kaj la grandan pliriĉiĝon de la programo pro la invito de H.Tonkin kaj JoMo, tio estas bona bilanco.

Partopreni tutsemajnan esperantumadon kostis ĉiun ĉeestinton monon kaj oni estis ofte korpe lacaj, sed ni sentis, ke la inspiraj prelegoj, la gajaj vesperoj, la kunkreita energio de amikeco donis al ni gajnon, kiu certe valoris la investon. ★

En la Botanika Ĝardeno



Dume, aliloke

Prelego prezentita dum la Jubilea Kongreso en Adelajdo

de Huigh Malcolm

Nia temo hodiaŭ estas la konkurso por la dizajno de estonta ĉef-urbo por la tiame nova federacio de Aŭstralio.

Inter 1902 kaj 1908, kvardek distriktoj estis proponitaj por esti ĉef-urbo de Aŭstralio, dudek-tri estis inspektitaj kaj sep elektitaj kiel kandidatoj. Unu el ili estas regiono konata kiel Yass-Canberra kaj tiu estas kiu estis anoncita kiel la loko por la ĉef-urbo en 1908 sed la nomo, Canberra, ne estis oficiale publike anoncata ĝis la 12a de marto 1913. Oni anoncis la dizajno-konkurson je la fino de aprilo, 1911.

Tiu ĉi temo prezentis sin al mi antaŭ ĉirkaŭ 35 jaroj, dum la sama tempo kiam mi esperantistiĝis. Tiutempe mi deĵoris kiel katalogisto en la biblioteko de la nova Universitato, Murdoch, en Perto. Tiam la Esperanto Ligo de Okcident Aŭstralio posedis grandan aron da libroj sed ne estis sufiĉaj volontuloj konservi la libraron. Krom tio, ili ne havis domon en kiu oni povintus surbretigi tiun libraron. Do ili petis la ĉef-bibliotekiston de la nova universitato ke ili transprenu la libraron al la Murdoch Universitata Biblioteko por ke ĝi estu profesie konservata.

Dum la Esperanta libraro restis en la universitata biblioteko iu devis katalogi la librojn kaj periodaĵojn ktp. Fine la tasko falis sur miajn ŝultrojn. Kiam mi komencis katalogi esperantajn librojn mi pensis: mi ne povas katalogi librojn kiujn mi ne povas legi kaj kompreni. Do mi komencis lerni la lingvon.

Unu tagon, inter la centoj da libroj, magazinoj, revuoj kaj aliaj presaĵoj de la esperanto libraro, mi trovis etan, maldiketan esperantlingvan broŝuron kies enhavo mirigis min.

Ĝi estis reklamo aŭ aviso, oficiala, publikigata de la departemento de Home Affairs pri la konkurso por la dizajno de proponata nova ĉef-urbo de la Federacio de Aŭstralio. Mi tuj rekonis ke tiu devas esti tre rara presaĵo do mi klasifikis ĝin en la aparta ĉambro kaj kolekto de raraj libroj en la Biblioteko.

Mi supozas, ke ĝi restas samloke hodiaŭ, sed de tiu tago ĝis nun, neniu revidis ĝin. Estas ege bedaŭrinde! Mi opinias ke, verŝajne la aĵo eniĝis en iun pli grandan libron kaj malaperis ĉar ĝi estas tiom malgranda kaj maldika.

Mi enketis la Nacian Arkivon ĉar la konkurso originis el la Departemento de Home Affairs (Internaj Aferoj) kaj ili aranĝis kaj

administris la tutan konkurson. Sed la nacia arkivo ŝajne ne posedas kopion de tiu presaĵo. Mi ankaŭ enketis la Nacian Bibliotekon de Aŭstrio kiu enhavas la plej grandan aron de Esperanto publikaĵoj; sed ankaŭ tie mi ne trovis la broŝuron.

Mi lernis de unu publikita historio de frua Kanbero ke esperantisto gajnis la trian premion en la konkurso kaj ke li eksciis pri la konkurso pere de Esperanto. Mi devis serĉi pluajn informerojn pri iu ajn aspekto de tiu afero. Do mi serĉis en Trove per la kombino de vortoj: "Canberra, design, competition, Esperanto".

Kio estas "Trove"?1 Trove estas kaj projekto kaj datumbazo kaj serĉebla ret-sito kiu enhavas dokumentojn de nia historio kaj kulturo. Tuj mi trovis artikoleton kiu aperis en la loka ĵurnalo The Canberra Times de 13a novembro 19512. Tiu artikolo menciis veteranan lokan Esperantiston, Gerald Whiteford, kiu diris ke li publikigis artikoleton en la gazeto de UEA, Esperanto de 20 julio 1911 kaj tiu artikoleto informis Alfred Agache kiu registris sin en la konkurso kaj gajnis la trian prezon.

Do, per Trove mi povis legi sur la ekrano tiun artikoleton de 1951 pri Gerald Whiteford kaj pri liaj agadoj en 1911. Nun mi deziregis legi la originalan artikoleton de Gerald Whiteford en la revuo Esperanto kiu instigis Alfred Agache registri sin en la konkurso.

Mi iris al la ret-sito de UEA sed ne povis trovi kopiojn de la fruaj numeroj de la revuo Esperanto tie. Do mi iris denove al la ret-sito de la Nacia Biblioteko de Aŭstrio. En la katalogo mi serĉis la titolon Esperanto kaj la peranton Universala Esperanto-Asocio. Mi trovis la enskribon por la revuo kaj legis unu linion de la enskribo kiu havas unu solan vorton, la germanlingvan vorton *Volltext*. Mi rapide klakis sur tiu ligilo. Aperis tabelo da jarnumeroj. Mi klakis sur la jaro 1911. Facile mi trovis la ĝustan numeron de la revuo, ekvidis, tralegis kaj elŝutis la artikolon de Gerald Whiteford.3

Kaj ĉi-tiu estas la artikolo kiun Gerald Whiteford verkis kaj Alfred Agache legis antaŭ cent jaroj:

"La Aŭstralianoj konstruas ĉefurbon.

Tre malofte okazas la neceso ke oni devas komenci la konstruadon de ĉefurbo sur tute neloĝata tereno, sed tio ĉi estas la tasko kiun la registaro de Aŭstralio difinis por si mem.

Urbetoj, urboj aŭ ĉefurboj ordinare kreskas grade laŭ la cirkonstancoj sed ĉi-tiu projekto estas unika ĉar la Aŭstralianoj intencas konstrui ĉefurbon kiu estu la plej moderna kaj la plej bela en la mondo.

Antaŭ kelkaj jaroj, Aŭstralio konsistis el kvin apartaj kontinentaj ŝtatoj kaj la insula ŝtato Tasmanio, sed en 1901, la voĉdono de la popolo starigis la Federacion de Aŭstralio nomata Commonwealth of Australia kaj sekvis la formiĝo de centra registaro por konduki la aferojn de la nacio.

Dum dek jaroj la parlamento de la Commonwealth kunvenis en Melburno, la plej granda urbo en la ŝtato de Viktorio sed nun la Commonwealth devas havi sian propran ĉefurbon kaj la konstruado estas komencota kiel eble plej baldaŭ. La loko elektita por la ĉefurbo estas apud Yass-Canberra en la ŝtato New South Wales kaj estas parto de la Federala Teritorio. Nun la loko de la estonta ĉefurbo havas nek domaron nek loĝantaron, sed espereble, post kelkaj jaroj, estos tie unu el la plej modernaj kaj belaj urboj de la mondo.

Por havigi la plej modernajn kaj plej bonajn ideojn, la registaro organizas

konkurson pri planoj por la konstruado de la ĉefurbo.

La konkurantoj povas ricevi la jenajn detalojn:

(1) Historiajn notojn, kondiĉojn de la konkurso, informon ĝeneralan, priskribojn kaj statistikojn pri meteorologio kaj klimato; (2) Landkarton montrantan la konturan termezuron de la ĉirkaŭ lando; (3) Landkarton montrantan la konturan termezuron de la loko de la urbo; (4) Topografian landkarton montrantan la



tutan Federalan Teritorion; (5) Landkarton de la ŝtato "New South Wales"; (6) Landkarton de la suda parto de la ŝtato "New South Wales"; (7) Geologian karton de la loko de la ĉefurbo; (8) Karton montrantan pluvajn kaj temperaturajn statistikojn; (9) Raporton de la Meteorologo de Aŭstralio pri la klimato kaj la distrikto: (10) Bildon panoraman.

La planoj devas atingi la Sekretarion de la *Department of Home Affairs*, Melburno antaŭ la 31-a de januaro 1912. Ni esperas, ke la Delegitoj de U.E.A. bonvolos konigi tiun gravan informon al la pri tio intereseblaj personoj en sia urbo. "

Do, tiel, unu el miaj celoj estis atingita. Serĉante pli, mi iris al la Nacia Arkivo por trafoliumi kelkajn arkivojn. Estas ekscita afero havi en la manoj la dokumentojn de Walter Burley Griffin kaj Alfred Agache. Legante la planojn de Agache mi ne povis ne rideti kiam mi legis parton de ili. Mi ne sugestas ke estas malbona dizajno sed parte, nuntempe ĝi aspektas iom ridinda. Ĉition li skribis, kaj mi tradukis ĝin el la angla:

"Sur la montetoj kliniĝantaj al la oriento de la urbo, kaj borderata per terasa vojo kiu sekvas horizontalan konturon, ni lokiĝis kelkajn konstruaĵojn kiuj devas esti lokitaj ekstere de la dense enloĝanta parto de la urbo samtempe sufiĉe proksima al la urbo.


(a) Granda frenezulejo simile al la konata ejo Steinhof (apud Vieno, Aŭstrio) estos konstruata tiel ke la enloĝantoj, malgraŭ ke ili estas enfermitaj en tute sekura ĉirkaŭaĵo, sentas sin liberaj, kaj ĉie havos la plej vastan vidon de la ĉirkaŭa kamparo....

(b) Granda kazerno estos konstruata sur najbara montpinto...

(c) Finfine ni provizos malliberejon kiu altiĝos, timinstiga sed pitoreska sur la plej alta pinto."

Kiel loĝanto de la nuntempa Kanbero mi ĝojas ke Esperantisto gajnis trian premion en la konkurso pri la urboplano; sed mi festas ke li ne gajnis la unuan premion kaj mi ne loĝas en urbo ĉirkaŭita, sur la tri plej altaj pintoj, de frenezulejo, kazerno milita kaj malliberejo timinstiga kiom ajn pitoreska!

Mi ankoraŭ ne eltrovis kiu en la tiama Aŭstralia registaro ekpensis kaj decidis publikigi la kondiĉojn de la konkurso Esperantlingve? Ŝajnas ke tiam, almenaŭ en unu parto de la registaro, Esperanto estis multe pli alte estimata ol nuntempe.★



Verda lageto en Rotorua

Geoterma miraklo

Kongresu kun NZEA en mirinda ferialoko, Rotorua!

de David Ryan

La venontjara kongreso de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA) okazos en Rotorua ekde la 28-a ĝis la 30-a de januaro 2012. NZEA kutime kongresas en granda urbo kiel Auckland, Wellington, aŭ Christchurch. Tamen, nun nova eta grupo de esperantistoj en la regiono de Rotorua pretas bonvenigi nin al la tiea mirinda loko.

Rotorua estas preferata ferialoko por multaj nov-zelandanoj kaj eksterlandanoj pro la maoria kulturo, bela pejzaĝo, naĝejoj de varma akvo, kaj vizitindaj lokoj por turistoj kaj sportuloj. Rotorua situas sudoriente de Auckland je proksimume tri horoj en aŭtomobilo. Ekde Wellington estas kvin horoj norden en aŭtomobilo. Por eksterlandanoj, estas pli facile flugi al Auckland kaj iri en aŭtomobilo aŭ aŭtobuso al Rotorua. Tamen, estas ankaŭ rektaj flugoj el Sydney per Air New Zealand, kaj ankaŭ el diversaj novzelandaj urboj.

Rotorua estas ĉarma malgranda urbo konstruita apud granda lago. Ĉirkaŭe estas multaj arbaroj kie eblas trankvile promeni aŭ bicikli. Pli da informoj pri Rotorua troviĝas en Esperanto en Vikipedio. La oficiala turisma retpaĝo por Rotorua (www.rotoruanz.com) havas informojn en diversaj lingvoj. Rotorua

altiras multajn vizitantojn el diversaj landoj kaj, pro tio, oni aŭdas surstrate multajn lingvojn. Tamen, Rotorua estas grava centro por la maoria lingvo pro la fakto ke multaj maorioj loĝas tie. Turistoj povas viziti antikvan maorian vilaĝon kaj art/kulturcentron, kaj ĝui tipan maorian manĝon kun dancado. Ĉu vi neniam vidis la 'haka'-militdancon? Vi vidos ĝin en Rotorua!

Kiel kutime, la kongreso de NZEA estos interesa afero kun riĉa programo. Ni baldaŭ povos konfirmi ĉeeston de bone konata Esperantisto el eksterlando kiun NZEA invitos al la kongreso por prelegi, instrui, kaj gvidi sesiojn – por doni internacian etoson kaj por paroligi nin ne en angla sed en Esperanto. Ni ankaŭ ekskursos – eble al geoterma loko kun gejseroj, bolanta koto, kaj enterigita maoria vilaĝo, aŭ al agrikultura centro kie vi lernos multon pri ŝafoj kaj ŝafhundoj.

La kongreso okazos en nova kongresejo en la urbcentro. Kongresanoj devos mendi propran loĝejon. Tamen, Rotorua havas amason da loĝeblecoj ekde gastejoj por junuloj/studentoj ĝis luksaj kvin-stelaj hoteloj. Prezoj estas ne tre altaj. Hoteloj kaj restoracioj troviĝas sur la ĉefa strato laŭ kiu estas tre plaĉe promeni en vespera varmeto.

Ni esperas vidi vin en Rotorua venontjare. Se vi venos el fora loko, kial ne resti kelkajn tagojn por koni la regionon kaj viziti apudajn turismajn lokojn? ★



Gejsero en Rotoru

Introduction - Eŭz beŭz


An unforgettable Esperanto School

de Max Wearing

Say "eŭz beŭz" as it would be pronounced in perfect Esperanto, and it sounds just like "Hell's bells!" as spoken in the most popular and least resented of English dialects to emerge from England's crowded capital, London.

Many people beginning to learn Esperanto in Australia have difficulty pronouncing words like "eŭro", "Eŭropo", and "eŭtanazio" and might envy the ease with which (right from the beginning) these words rolled from the mouth of the radical South Australian esperantist who proudly signs himself "Gordon Coleman, Tottenham boy in exile." As an ex-Londoner he still retains the sound of "eŭz beŭz" ringing in his ears.

For the last few years Gordon has been the only person teaching Esperanto as a LOTE (language other than English) in Australian primary schools. Here are 3 photos, a report of




A moment of happy group chaos

his latest venture, a 3-day winter school rigged up at a few weeks' notice, and a concluding personal footnote.

To celebrate the Queen's Birthday long weekend, Gordon Coleman, a royalist as well as a committed esperantist, convened an Esperanto Winter School at the campus of Sheidow Park State Primary School (20 kms south of Adelaide), where he now teaches. He had previously taught Esperanto as a LOTE for five years at a neighbouring school at Hackham South. At the Sheidow Park school, another staff member teaches Japanese as a LOTE as well, and fortunately there is absolutely no conflict between the two LOTE programs being taught there simultaneously.

At this long weekend Esperanto Winter School, there were morning classes given by Trevor Steele (for advanced learners), Sandor Horvath (for intermediate ones) and Gordon Coleman (for beginners). The school was part of preparations for the Australian Esperanto Association's 100th anniversary of its first congress (1911) on the North Terrace campus of the University of Adelaide. The jubilee congress will be held from Friday 8th until Saturday 16th July at that same campus, beginning, however, at the Adelaide Folk Federation with a concert by JoMo, esperantist rock and folk singer from France. Professor Humphrey Tonkin, formerly Vice-Chancellor of a prestigious US university and a president of UEA (the World Esperanto Association), will give a public lecture about Esperanto during the evening of Tuesday 12th. Further information about the jubilee celebration's program (which also offers Esperanto courses for beginners) is obtainable from Indrani Beharry-Lall, 71 Hindmarsh Circuit, MAWSON LAKES 5095.

Brendan Linane struggles with an interactive white board while comparing the complexities of the Polish language with the regularities of Esperanto.



Sheidow Park School's Esperanto Winter School attracted 21 participants including the school's Principal, Jenny Engelhardt, three esperantists enrolled in the World Esperanto Congress in Copenhagen from the 23rd to the 30th July, and some bi- or multi-lingual "exotic' participants from Iran, Libya, England, Scotland, Hungary, and Austria. Participants' ages ranged from 10 to 78.

The Esperanto Winter School at Sheidow Park was extremely successful, offering classes in the morning, a daily midday lunch prepared at the school by Ann Coleman,

afternoon karaoke singing of popular Esperanto songs including some of those sung by the Netherlands folk group, Kajto, and some from the repertoire of JoMo. After the karaoke singing, members of the winter school, including the two school boys, gave talks about their past Esperanto experiences, and linguist Brendan Linnane entertained us with examples of the complexities of Polish, the language he and Carol have most recently been studying.

During the afternoon of the last day, the group took a short wine-tasting tour of southern vales wineries and came back with some wine from the Temple-Bruer winery, home of the late Barbara Bruer who in the late 1980s studied Esperanto to "supera diplomo" level while teaching Esperanto to her baby daughter, Heather, before the child had learned even one word of English. Our excursion also included a delicious, competitively priced banquet in a hotel in Lonsdale.

The long weekend Winter School was such a huge success that it will almost certainly be repeated during the Queen's Birthday long weekend of June 2012. Ĝis la revido! (Seeya!)

A CONCLUDING PERSONAL FOOTNOTE: Perhaps because of the reference to London, Gordon reminded me of Crichton, the main character in Sir James Barrie's "The Admirable Crichton", a theatrical masterpiece that first appeared during the years before World-War I when Zamenhof was nominated for a Nobel Peace Prize and was awarded the French Legion of Honour.

Crichton, almost as famous then as Peter Pan became (and remained) after his creation in Barrie's next great West End success, was butler to Lord Loam, a rich and rather fatuously idealistic aristocrat who went cruising on his yacht with family, servants, and a group of his titled friends. After the yacht was wrecked and its occupants marooned on a deserted tropical island for a couple of years, it was the practical skills and resourcefulness of Crichton that kept the upper-class passengers from dying of starvation.

For the afternoon karaoke sessions, Gordon had prepared and duplicated a song-book with words and melodies gathered from various internet sites. He also recorded performances of these songs with their words printed on or below the images. These he projected on to an enormous whiteboard - to the utter amazement of Trevor, Sandor, and others, who imagined that Gordon must have used almost satanic technical skills to prepare these images himself. Sandor hastened to ask for a copy of them for his use at next month's jubilee congress.

After the session was over, Gordon invited us to a computer room with a dozen or more computers already set up for us while he downloaded (and displayed on yet another huge whiteboard) the websites and contents of numerous Esperanto teaching programs which are available free of charge. Most of these were unfamiliar to us. Trevor hadn't even heard of "edukado.net" or known that it had been set up by Dr Katalin Kovats.

With all these resources at his fingertips, his boundless energy, and his entertaining teaching manner, Gordon is a wonderful Esperanto teacher even if he has no pretensions yet of having a detailed knowledge of Esperanto grammar or literature. At the two schools where he has been teaching he has promoted the language to no fewer than a hundred children and through them to countless parents and friends. He is one of our best "varbantoj". I had no hesitation in nominating him for a term on the AEA "estraro" a couple of years ago and I recently seconded Trevor's nomination of him to join the "estraro" once again, after we heard that there were a few "estraro" vacancies to fill. Unfortunately our nomination was ignored by the remaining "estraranoj", who filled the vacancies with new

members of their own choosing without any reference to the general AEA membership whatsoever.

I consider this a great pity. Gordon has no pretensions of being a learned grammarian or litterateur - or of having ambitions to become a textbook writer or language politician - but he is endowed with an abundance of energy, practical skills, resourcefulness, and down-to-earth common sense that make him an excellent teacher, a good events organiser, and a potential contributor to the much needed revivification of AEA. As he becomes more experienced with the language, he might also become a historian of the Australian Esperanto movement. A large part of his degree from the University of SA was made up of history units for each of which he received nothing less than a distinction.★

Some participants in Sheidow Park's Queen's Birthday long week-end Esperanto Winter School

Standing: Beth Wearing (retired secondary English teacher), Jamal Mazraeh (Iranian calligrapher), Carol & Brendan Linnane (linguists presently studying Polish), Ann Coleman (winter school's assistant convenor), Max Wearing (Esperanto world traveller), Ivan Heldzingen (Melbourne esperantist & world traveller), Sandor Horvath (ESL teacher for Uni of SA and Thebarton Senior College), Trevor Steele (renowned author in English and Esperanto), Katja Steele (nee Bodnarova, highly qualified Esperanto teacher from Slovakia).

Seated: Stewart Glass (photographer & Esperanto student), Ann Sanders (teacher of Indian languages), Perry and Michael (schoolboys from Melbourne), Heather Heldzingen (Melbourne Esperanto editor and world traveller).




"Free Software"

Senpagaj komputilaj programoj

de Thomas Karpiniec

En la komputila mondo estas movado nomata "liberaj programoj" (angle Free Software). Ĝia celo estas verki kaj reklami komputilajn programojn kiuj donas al siaj uzantoj specialajn rajtojn:

1. La rajto uzi la programon pro iu ajn kialo.
2. La rajto studi la manieron per kiu la programo funkcias kaj ŝanĝi la programon.
3. La rajto disdoni la programon kaj kun ŝanĝoj kaj neŝanĝite.



La movado kredas ke estas neakcepteble ke la verkistoj de komputilaj programoj malpermesu disdonadon. Disdonado estas kiel ni helpas niajn amikojn. Socio pliboniĝus se ĉiuj havus la plej bonajn komputilajn programojn. Pro tio, liberaj programoj kutime estas elŝuteblaj tute senkoste.

Ekzemploj de popularaj liberaj programoj estas: Mozilla Firefox kaj Thunderbird, LibreOffice kaj Pidgin. Tiel popularaj ili estas, ke ili estas ofte uzataj eĉ per neliberaj mastrumaj sistemoj, kiel Microsoft Windows kaj Apple OS X.

La plejparto de la komputilaj programoj uzataj nuntempe estas komerce aĉeteblaj, sed multaj senpagaj programoj ankaŭ ekzistas! Ekde 1992 estis eble uzi kutiman komputilon tute per nur senpagaj programoj. Unue, komputila lerteco estis bezonata, sed nuntempe ne necesas esti spertulo por uzi tiujn senpagajn programojn.

"nuntempe ne necesas esti spertulo por uzi tiujn senpagajn programojn"

La plej popularaj senkostaj programoj "distribuoj" estas nomataj "GNU/Linux". La unua parto estas la GNU Projekto, mastruma sistemo verkita dum la 1980-aj jaroj ĉefe por ebligi senkostan komputadon. La alia parto estas *Linukso*, kies tasko estas direkti la fizikajn aĵojn de la komputilo.

Estas multaj distribuoj haveblaj; unu el la plej popularaj kaj plej facile uzebla estas nomata Ubuntu (http://www.ubuntu.com/). Oni povas elŝuti ĝin kaj testi rekte el codoromo sen postulo instali ion unue.

Ĉar iu ajn povas kontribui al liberajn programojn, multaj Esperantistoj jam faris tradukaĵojn. Kun GNU/Linux estas eble uzi multajn programojn tute per Esperanto!

Se vi volas legi plu pri liberaj programoj, vizitu la retpaĝon de la Free Software Society, http://www.fsf.org/.★

Thomas Karpiniec *estas ano de la Tasmania Esperanto Societo.*

Ni komencu urso-kurson!


Instruado de Esperanton en elementa lernejo

de Gordon Coleman

Mi aŭdis la vorton Esperanto antaŭ multaj jaroj, kiam mi frekventis baz-lernejon. Mi memoras, ke mia patro diris, ke Esperanto estas lingvo de spionoj; kaj Anna, mia edzino el Skotlando, memoras la lingvon kiel lingvon de komerco.

Tamen, la vorto simple velkis en mia memoro dum kvardek jaroj aŭ pli, ĝis januaro 2005, kiam mi aŭdis en Radio ABC virinon, kiu parolis pri Esperanto. Anna kaj mi aŭskultis kun intereso, kaj mi decidis pli informiĝi pri ĝi. Tio gvidis min al Max Wearing kaj lia edzino Beth. Tiun saman jaron mi ĉeestis kurson de NASK (Nord-Amerika Somer-Kursaro) en Vermont.

Tiutempe mi laboris ĉe elementa lernejo Hackham South, kie mi instruis klason de jaro ses/sep. Mi demandis al mia ĉefinstruisto ĉu li permesus al mi instrui Esperanton al



mia klaso, ĉar la lernejo ne plu havis LOTE (language other than English - lingvo krom la angla). Mi estis tre feliĉa, kiam mia ĉefo donis al mi permeson komenci doni lecionojn pri Esperanto.

Dum la sekvantaj jaroj mi uzis por miaj lecionoj diversajn rimedojn, kiujn mi akiris de diversaj fontoj el Aŭstralio kaj el aliaj landoj.

La du ĉefaj kursoj estis Urso-Kurso, rekomendita de la Brita Esperanto-Asocio en la programo, *Springboard to Languages*. Tiu pilot-programo kaj ĝiaj rimedoj estis tiutempe uzataj en britaj elementaj lernejoj kaj disdonataj tute senkoste. Jes la brita asocio donis siajn pilot-instru-rimedojn senkoste! Kaj.....senkoste ili ankoraŭ provizas ilin.

La alia kurso, kiun mi povis aĉeti, estis tre bona rimedo disdonita de LOTE-provizanto en Okcident-Aŭstralio. Ĝia nomo estas *Ni Komencu*.

Ambaŭ kursoj, kiujn mi uzis estas bonegaj por instrui Esperanton je elementa lernej-nivelo, kaj eĉ en mezlernejoj. Ni havas ankaŭ la malnovan serion, Brita Mezlerneja Esperanto, kiu uzeblus kiel daŭriga kurso kaj kiu povus eĉ servi kiel fundamenta kurso por establi atingo-normon por Esperanto-LOTE en Australio.

La listo de malalt-kostaj kaj haveblaj kursoj kaj rimedoj estas tre vasta kaj povas esti facile havebla per la interreto. Antaŭ du jaroj mi aĉetis la libron Esperanto By Direct Method de Stano Marĉek, kaj mi nun preferas ĝin.

Same kiel Urso-Kurso ĝi kunhavas kompakt-diskon. Ambaŭ kursoj kostis po $20 ĝis $30. Ne necesis aĉeti la aliajn kursojn, sed mi volis elekti krom-materialojn. La libro de Marĉek estas malmultekosta, sed altvalorega, kaj cetere, miaj lernantoj ŝategas ĝin - kio tre gravas. La kompakt-disko estas tre utila por aŭskultado kaj kunlegado de la lernantoj, kaj ĝia prononc-maniero estas tre fidinda.

Mi aĉetis plurajn aliajn librojn kaj multaj rimedoj haveblas per la interreto. *Lernu!* estas bonega rimedo, per kiu oni povas akiri diversajn kursojn senkoste. Oni pagas nur la koston de la presado. Kaj, kompreneble, Kurso de Esperanto, estas senkoste elŝutebla programo, kiu havas kelkajn bonegajn aktivadojn por la uzado de la klasinstruisto, precipe sur elektronika interaktiva blanka tabulo. Haveblas ja multe da senkostaj aŭ malmultekostaj materialoj por la klasinstruisto, kiuj forigas la neceson elspezi grandan monsumon por LOTE.

Io, pri kio mi devas atentigi ĉi tie estas, ke lernejoj ne havas milojn da dolaroj por elspezi, kaj se malmultekosta rimedo troveblas, tio influos la decidojn de lernejestroj. Ĉiuj instruistoj kiujn mi konas postulas ke tekstoj estu bonprezaj, provizu respondojn al la ekzercoj, kaj estu kopirajt-liberaj por permesi al instruistoj disdoni kopiojn de paĝoj al la klasanoj. Estas kompreneble, ke unu el la unuaj aferoj, kiujn instruistoj rigardas sur lerno-libro estas la prezo!

La plejmulto de
pozitiva sperto. Kia
prezidanto de la AE
mia klaso saltis ĉe
anoncon, el kiu Igo
tamen, ke ĝi ne ap
Pasintjare, mi d
monatojn sen instr
apartaj lernejoj. Ĉi-
Sheidow Park. Mi d
estus al ŝi egale, s
akceptis (eĉ bonve
peti ŝian aprobon,
La duan de apr
okazigi Esperanto
estis iomete last-m
kunvenigi 21 homo
sperto montras, ke
en lernejo, kie oni
organizi E-vintro-ku
Mi esperas, ke vi p
KONKLUDO:
Ni devas komp
aliaj homoj - kaj gr
la impreson, ke ni
pli bone enkonduki
studobjekton, prefe
Tiamaniere, ni pov
instruos klason de
aŭdos pri la lingvo,
kaj konatuloj. Post
respondi ne "Kio e
de mia infano aŭ n
komuniki kun infan
★

Gordon Coleman

New Zealand Esperanto Associati

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
exec@esperanto.org.nz
0800 350 781

David Ryan | President
ryangomez@xtra.co.nz

Chris Krägeloh | Vice-Presiden
chris.krageloh@gmail.com

Donald Rogers | Treasurer
dero2648@clear.net.nz

Bradley McDonald | Secretary
bradley.m@woosh.co.nz

Howard Gravatt | Assistant Secre
hgravatt@ihug.co.nz

Erin McGifford | Committee Mem
erinmcgifford@hotmail.com

NZEA's vision is for everyone in Ne Zealand to recognise the value of Esperanto as an international langu

NZEA is one of the oldest Esperant associations in the world, and is responsible for promoting Esperant New Zealand, providing learning material, answering queries from th public about Esperanto, and organi the annual NZEA conference.

FEED YOUR ESPERANTO

Esperanto is an amazing language. So
Esperanto clubs and social groups around the
gatherings, congre

Others learn

TRUETOUCH

"Pasporta Servo" is a network of Esperanto